

Thomas Moore,
La lasta rozo de
somero

tradukita de N. N. 101

Nun floras de l'somero la so-
la lasta rozo.
La kunvivantoj ĝiaj velkis
en mortripozo:
ne estas flor' parenca, aŭ
rozburĝono ia,
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn re-
doni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la
tronket' plendeti
Ĉar la beluloj dormas, vi
devas kundormeti.
En morto, sen parfumo,
l'amikoj jam dormetas:
Do floron vian teren ĝentile
mi disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se
l'amikec' finiĝus
Aŭ la juveloj brilaj de
l'amular' foriĝus:
Ĉar se la koroj veraĵ kaj
dolĉaj ne plu estus,
En la dezerta mondo volon-
te kiu restus?

*Traduko de la Angla poemo "T
is the Last Rose of Summer"
de THOMAS MOORE (*1779-
05-28 - †1852-02-25) en Espe-
ranton de N. N. 101.*

Arg-530-2211 (2014-11-03
22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo
troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.

Thomas Moore,
'T is the Last Rose of
Summer

'T is the last rose of summer left
blooming alone;
All her lovely companions are
faded and gone;
No flower of her kindred, no ro-
sebud is nigh,
To reflect back her blushes, to
give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one!
To pine on the stem;
Since the lovely are sleeping, go
sleep thou with them.
Thus kindly I scatter thy leaves
o'er the bed,
Where thy mates of the garden
lie scentless and dead.

So soon may I follow when fri-
endships decay,
And from Love's shining circle
the gems drop away.
When true hearts lie wither'd
and fond ones are flown,
Oh! who would inhabit this
bleak world alone?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo
estas THOMAS MOORE (*1779-05-
28 - †1852-02-25).*

Arg-530-1053 (2014-11-04
07:57:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun
poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>.
Pri la verkinto, la irlanda poeto
Thomas Moore, vidu la vikipedian
retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore.

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

Jen floras sola, forlasita la lasta
rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkin-
te kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-
burĝono en proksimo,
Por intersanĝi la ridetojn aŭ la
sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,
ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do
iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas
sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva
kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l'
amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos
lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj, sen-
temaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en
malvarma mondo?

*Traduko de la Angla poemo "T
is the Last Rose of Summer" de THO-
MAS MOORE (*1779-05-28 - †1852-
02-25) en Esperanton de ANTONI
GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-
07-04).*

Arg-530-1056 (2010-03-28
19:37:25)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred
Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.